

La Pupa Domo

verkis Katherine Mansfield, tradukis Brian Fox

Kiam kara maljuna S-ino Hay reiris al la urbo, post gastis ĉe la familio Burnell, ŝi sendis pupan domon por la infanoj. Ĝi estis tiom granda, ke la ĉaristo kaj Patriko portis ĝin en la korton, kaj tie ĝi restis, apogita sur du lignaj skatoloj, apud la pordo de la nutra ĉambro. Nenia difekto povus okazi al ĝi; estis somero. Kaj eble laodoro de farbo foriros ĝis la tempo, kiam oni devos porti ĝin internen. Ĉar, vere, laodoro de farbo venis de tiu pupa domo (“Dolĉe de maljuna S-ino Hay, kompreneble; plej afable kaj malavare!”) – sed laodoro de farbo tute sufiĉis por malsanigi iun ajn, laŭ la opinio de onklino Berila. Antaŭ ol oni eĉ forprenis la sakan ŝtofon. Kaj, kiam ĝi ja estis for

Jen staris la pupa domo, malhela, olee aspekta, spinace verda, ornamita per brila flavo. Ĝiaj du solidaj etaj fumtuboj, kiujn oni farbis ruĝe kaj blanke, gluita sur la tegmento; kaj la pordo, brilis per flava verniso, estis kiel eta slabo de butera karamelo. Kvar fenestroj, veraj fenestroj, dividiĝis en vitrojn per larĝa strio de verdo. Efektive ankaŭ estis eta antaŭpordo farbite flava, kun grandaj buloj de solidiĝa farbo pendanta laŭ la rando.

Sed perfekta, perfekta eta domo! Al kiu laodoro povus eble gravi? Ĝi estis parto de la ĝojo, parto de la noveco.

“Rapide malfermu ĝin, iu!”

La kroĉilo ĉe la flanko tre fiksiĝis. Patriko pelis ĝin malferme per sia poŝa tranĉilo, kaj la tuta doma fronto svingiĝis flanken, kaj – jen oni rigardis, je unu kaj la sama momento, en la salonon kaj la manĝoĉambron, la kuirejon kaj du dormĉambrojn. Tio estas la maniero, laŭ kiu domo malfermiĝu! Kial ĉiuj domoj ne tiel malfermiĝas? Kiom pli ekscite, ol strabe rigardi tra fendo de pordo en humile etan vestiblon kun ĉapela stablo kaj du ombreloj! Tio estas – ĉu ne? – kion oni sopiras scii pri domo, kiam oni metas sian manon sur la frapilon. Eble tiel estas, kiel Dio malfermas domojn en la profundo de nokto, kiam Li kviete promenas kun anĝelo. ...

“Ho-ho!” La infanoj Burnell kriis kvazaŭ ili malesperis. Ĝi estis tro miriga; ĝi estis tro multo por ili. Ili neniam vidis ion tian, en siaj vivoj. Ĉiuj ĉambroj havis tapetan paperon. Estis pentraĵoj sur la muroj, pentritaj sur la papero, komplete kun oraj kadroj. Ruĝa tapiŝo kovris ĉiujn plankojn, krom la kuirejo; ruĝaj pluŝaj foteloj en la salono, verdaj seĝoj en la manĝoĉambro; tabloj, litoj kun realaj kovriloj, beba lulilo, fornelo, vaza ŝranko kun etaj teleroj kaj unu granda kruĉo. Sed, kion Kezia ŝatis pli ol ion ajn, kion ŝi treege ŝatis, estis la lampo. Ĝi staris en la centro de la manĝoĉambra tablo, rava eta sukkena lampo kun blanka globo. Ĝi eĉ jam pleniĝis tute preta por eklumigi, tamen kompreneble, oni ne povus lumigi ĝin. Sed estis io interne, kiu moviĝis, kiam oni skuis ĝin.

La patra kaj patrinoj pupoj, kiuj dissterniĝis tre rigide, kvazaŭ ili jam svenis en la salono, kaj iliaj du etaj gefiloj, dormis en la supra ĉambro, vere estis tro grandaj por la pupa domo. Ili ne aspektis kvazaŭ ili apartenis. Sed la lampo estis perfekta. Ĝi ŝajnis rideti al Kezia, por diri, “Mi loĝas ĉi tie.” La lampo estis reala.

La infanoj Burnell apenaŭ povis sufiĉe rapide marŝi al la lernejo, en la sekva mateno. Ili ardis por diri al ĉiuj, por priskribi, por – nu – por fanfaroni pri sia

pupa domo, antaŭ ol la lerneja sonorilo sonis.

“Estu mi, kiu rakontos,” diris Isabela, “ĉar mi estas la plej aĝa. Kaj vi du povos poste aldoni. Sed estu mi, kiu unue diros.”

Estis nenio, al kiu oni respondu. Isabela estis mastrema, sed ŝi ĉiam pravis, kaj Ĉarlota kaj Kezia tre bone sciis la potencon, kiu akompanis la plej aĝan. Ili vadis tra la densa ranunkolo ĉe la flanko de la vojo kaj diris nenion.

“Kaj estu mi, kiu selektos tiujn, kiuj venos por vidi ĝin, unue. Patrino diris, ke mi rajtas.

Ĉar oni aranĝis, ke dum la pupa domo staros en la korto, ili rajtos inviti knabinojn de la lernejo, duope veni kaj rigardi. Ne resti por posttagmeza manĝo, kompreneble, aŭ por enire vagi tra la domo. Sed nur por silente stari en la korto, dum Isabela montras la belaĵojn, kaj Ĉarlota kaj Kezia aspektas kontentaj. ...

Sed rapidi kiel ili provis, ĝis la tempo, kiam ili atingis la gudre farban palisaron de la knaba luda korto, la sonorilo komencis klake tinti. Ili havis nur tempon por fortiri siajn ĉapelojn kaj stare viciĝi, antaŭ ol oni voĉe kontrolis la ĉeestantojn. Ne gravas. Isabela provis kompensi pri tio per mieno, ke si estas tre impona kaj mistera, kaj flustri malantaŭ sia mano al knabinoj apud si, “Havas ion, por diri al vi en luda paŭzo.”

Luda paŭzo venis kaj ili ĉirkaŭis ŝin. La knabinoj en ŝia klaso preskaŭ batalis por meti siajn brakojn ĉirkaŭ ŝin, por forpromeni kun ŝi, por flate rideti, por esti ŝia aparta amikino. Ŝi traktis rimarkindan kortumon sub la grandegaj pinarboj ĉe la flanko de la luda korto. Puŝete, kune subridade, la knabinoj kunpremiĝis. Kaj la solaj du, kiuj restis ekster la cirklo, estis la du, kiuj ĉiam estis ekster, la etaj knabinoj Kelvey. Ili sciis pli saĝe ol veni ie proksime al familianoj de Burnell.

Ĉar efektive, la lernejo, kiun la infanoj Burnell ĉeestis, tute ne estis la speco de loko, kiun la gepatroj selektus, se estus ia elekto. Sed estis neniu. Ĝi estis la sola lernejo en kilometroj. Kaj sekvis, ke ĉiuj infanoj en la ĉirkaŭo, la etaj knabinoj de la juĝisto, la filinoj de la kuracisto, la infanoj de la butikisto, de la melkisto, pro neceso, devis intermiksiĝi. Ne menciis, ke ankaŭ estis egala nombro de malĝentilaj krudaj knaboj. Sed oni devis ie trakti linion. Oni trafis ĝin ĉe la infanoj Kelvey. Multaj el la infanoj, inkluzive de Burnell, ne rajtis eĉ paroli al ili. Ili marŝis preter la infanoj Kelvey kun sia kapo en la aero, kaj pro tio, ke ili fiksis la modon pri ĉia speco de konduto, ĉiuj evitis familion Kelvey. Eĉ la instruistino havis apartan voĉon por ili, kaj apartan rideton por la aliaj infanoj, kiam Lilia Kelvey venis al la instruista pupitro kun fasko de terure banale aspektaj floroj.

Ili estis la filinoj de vigla, laborema eta lesiva lavistino, kiu tage ĉirkaŭiris de domo al domo. Tio estis sufiĉe sen digno, sed, kie estis S-ro Kelvey? Neniu sciis kun certigo. Sed ĉiuj diris, ke li estas en prizono. Do, ili estis la filinoj de lesiva lavistino kaj malliberulo. Tre ĉarma kunuleco por infanoj de aliaj homoj! Kaj ili aspektis tiaj. Kial S-ino Kelvey traktis ilin tiom elstare, estas malfacile kompreni. La vero estis, ke ŝi vestis ilin en “pecoj”, donitaj far la personoj, por kiuj ŝi laboris. Lilia, ekzemple, kiu estis dika nebela infano kun grandaj efelidoj, ĉeestis la lernejon en robo farite el verda arte serĝa tablotuko de la familio Burnell, kun ruĝe pluŝaj manikoj, farita al kurtenoj de la familio Logan. Ŝia ĉapelo, supre sidanta sur ŝia alta frunto, estis ĉapelo de plenkreska virino, iam estis la proprajo de Fraŭlino Lecky, la poŝtista estrino. Ĝi turniĝis supren ĉe la

dorso, kaj ornamiĝis per granda skarлата plumo. Kia eta groteska figuro ŝi aspektis! Estis maleble ne ridi. Kaj ŝia eta fratino, nia Elsa, portis longan blankan robon, iel similan al nokta vesto, kaj paron de etaj knabaj botoj. Sed kion ajn nia Elsa portus, ŝi aspektus stranga. Ŝi estis eta koka osteto de infano, kun mallonge tondita hararo kaj grandegaj solenaj okuloj – eta blanka strigo. Neniu iam vidis ŝin rideti; ŝi apenaŭ iam ajn parolis. Ŝi trairis vivon tenante al Lilia, kun parto de la jupo de Lilia ĉifita en sia mano. Kien Lilia iris, tien nia Elsa sekvis. En la luda korto, sur la vojo iri al kaj de la lernejo, jen estis Lilia marŝi unue, kaj nia Elsa teni malantaŭe. Nur, kiam ŝi deziris ion, aŭ ŝia spiro paŭzis, nia Elsa faris tiron, tordon, kaj Lilia haltis kaj turniĝis. La fratinoj Kelvey neniam miskomprenis, iu la alian.

Nun ili ŝvebis ĉe la rando; oni ne povis malpermesi ilin aŭskulti. Kiam la malgrandaj knabinoj turniĝis kaj rikanis, Lilia, kiel kutime faris sian stulte honteman rideton, sed nia Elsa nur rigardis.

Kaj la voĉo de Isabela, tiel tre fiero, daŭris rakonti. La tapiŝo faris grandan sensacion, sed ankaŭ tion faris la litoj kun realaj kovriloj, kaj la fornelo kun bakuja pordo.

Kiam ŝi finiĝis, Kezia interrompis. “Vi forgesis la lampon, Isabela.”

“Ho, jes,” diris Isabela, “kaj estas eta malgranda lampo, ĉio farita el flava vitro, kun blanka globo, kiu staras sur la manĝoĉambra tablo. Oni ne povus distingi ĝin de reala lampo.”

“La lampo estas la plej bona el ĉio,” kriis Kezia. Ŝi kredis, ke Isabela ne duone sufiĉe laŭdis la etan lampon. Sed neniu atentis. Isabela nun selektis la du, kiuj revenos kun ili, en tiu posttagmezo, por vidi ĝin. Ŝia elekto estis Emilia Cole kaj Lena Logan. Sed, kiam la aliaj sciis, ke ili ĉiuj havos ŝancon, ili ne povis esti pli afablaj al Isabela. Unuope oni metis sian brakon ĉirkaŭ la talion de Isabela kaj forpromenis kun ŝi. Ĉiu havis ion por flustri al ŝi, sekreton, “Isabela estas *mia* amikino.”

Nur la etulinoj Kelvey formoviĝis forgesite; estis nenio, kiun ili povus plu aŭdi.

Tagoj forpasis, kaj ju pli da infanoj vidis la pupan domon, des pli ĝia famo vastiĝis. La sola demando estis, “Ĉu vi jam vidis la pupan domon ĉe Burnell? Ho, kiel bela!” “Ĉu vi ne vidis ĝin? Ho, kia domaĝo!”

Eĉ la lunĉan horon, oni pasigis en parolo pri ĝi. La etaj knabinoj sidis sub la pinarboj, manĝante siajn dikajn ŝafaĵajn sandviĉojn kaj grandajn slabojn de disko-kuko ŝmiritajn per butero. Dume, ĉiam tiom proksime kiom eble, sidis fratinoj Kelvey, nia Elsa tenis al Lilia, ankaŭ aŭskultante, dum ili maĉis siajn konfitaĵajn sandviĉojn el ĵurnala papero trempita per grandaj ruĝaj makuloj. ...

“Patrino,” diris Kezia, “ĉu mi ne rajtos inviti, nur unufoje, la infanojn Kelvey?”

“Certe ne, Kezia.”

“Sed kial ne?”

“Forkuru, Kezia; vi scias tute bone kial ne.”

Finfine ĉiuj jam vidis ĝin krom ili. En tiu tago, la temo iom velkis. Estis la lunĉa horo. La infanoj kune staris sub la pinarboj, kaj subite, dum ili rigardis la fratinojn Kelvey, kiuj manĝis el ilia ĵurnala papero, ĉiam solaj, ĉiam aŭskutantaj; oni emis esti abomena al ili. Emilia Cole komencis la flustradon.

“Lilia Kelvey estos servistino, kiam ŝi plene kreskos!”

“Ho-ho, kiel terura!” diris Isabela Burnell, kaj ŝi okule faris mienon al Emilia.

Emilia glutis en tre signifa maniero kaj kapjesis al Isabela, kion ŝi vidis ŝian patrinon fari en similaj okazoj.

“Esti vere – esti vere – esti vere,” ŝi diris.

Tiam la etaj okuloj de Lena Logan ek grandiĝis. “Ĉu mi demandos al ŝi?” ŝi flustris.

“Mi vetas, ke vi ne!” diris Jesika May.

“Puf, mi ne timas,” diris Lena. Subite ŝi faris etan knaron, kaj dancis antaŭ la aliaj knabinoj. “Observu! Observu min! Observu min nun!” diris Lena. Kaj glitante, glisante, trenante unu piedon, subbridadante malantaŭ sia mano, Lena transiris al la infanoj Kelvey.

Lilia supren rigardis de sia manĝo. Ŝi rapide volvis la paperon ĉirkaŭ la restaĵon. Elsa ĉesis maĉi. Kio nun venos?

“Ĉu estas vere, ke vi estos servistino, kiam vi plene kreskos, Lilia Kelvey?” kriĉis Lena.

Morta silento. Sed anstataŭ respondi, Lilia nur donis sian stulte honteman rideton. Ŝajnis, ke tute ne gravis al ŝi, tiu demando. Kia fiasko por Lena! La knabinoj komencis ete subridi.

Lena ne povis toleri tion. Ŝi metis siajn manojn sur siajn koksojn; ŝi impetis antaŭen. “Ja, via patro estas en karceri!” ŝi spiteme siblis.

Ĉi tio estis tiom mirinda diraĵo, ke la etaj knabinoj forkuris en amaso, profunde, profunde ekscite, freneze pro ĝojo. Iu trovis longan ŝnuron, kaj ili komencis ŝnursalti. Kaj ili neniam tiom alte saltis, tiom rapide enkuris kaj elkuris, aŭ faris tiel aŭdacajn agojn, kiel en tiu mateno.

En la posttagmezo, Patriko venis por la infanoj Burnell kun la kaleŝo kaj ili veturis hejmen. Ĉeestis vizitantoj. Isabela kaj Ĉarlota, kiuj ŝatis vizitantojn, iris al la supra etaĝo, por ŝanĝi siajn antaŭtukojn. Sed Kezia ŝtele iris al malantaŭ la domo. Estis neniu ĉirkaŭe; ŝi komencis svingiĝi sur la grandaj blankaj pordegoj de la korto. Baldaŭ, rigardante laŭ la vojo, ŝi vidis du etajn punktojn. Ili grandiĝis, ili nun venis ĉi tien al ŝi. Nun ŝi povis vidi, ke unu estis antaŭe kaj unu proksime sekvis. Nun ŝi povis vidi, ke ili estis la fratinoj Kelvey. Kezia ĉesis svingiĝi. Ŝi glitis de la pordego kvazaŭ ŝi forkuros. Tiam ŝi hezitis. La fratinoj Kelvey venis pli proksimen, kaj apud ili promenis iliaj ombroj tre longaj, etendantaj tute trans la vojo kun iliaj kapoj inter la ranunkoloj. Kezia grimpis reen sur la pordego; ŝi decidiĝis; ŝi svingiĝis eksteren.

“Hola!” ŝi diris al la pasantaj fratinoj.

Ili tiom miris, ke ili haltis. Lilia donis sian stulte etan rideton. Nia Elsa fikse rigardis.

“Vi povos veni kaj vidi nian pupan domon, se vi deziras,” diris Kezia, dum ŝi trenis unu piedfingron sur la grundo. Sed tiumomente Lilia fariĝis ruĝe vizaĝa kaj rapide skuis la kapon.

“Kial ne?” demandis Kezia.

Lilia anhelis, tiam ŝi diris, “Via panjo diris al nia panjo, ke vi ne parolu al ni.”

“Ho, nu,” diris Kezia. Ŝi ne sciis, kion respondi. “Tio ne gravas. Vi povos vidi nian pupan domon, tute same. Alvenu. Neniu observas.”

Sed Lilia skuis sian kapon eĉ pli forte.

“Ĉu vi ne volas vidi?” demandis Kezia.

Subite estis tordo, tiro al la jupo de Lilia. Ŝi turniĝis. Elsa nun rigardis ŝin per grandaj petegaj okuloj; ŝi sulkgigis la frunton; ŝi ja volis iri. Momente Lilia tre dube rigardis al nia Elsa. Sed tiam nia Elsa ree tiris ŝian jupon. Ŝi komenciĝis antaŭen. Kezia kondukis kien. Kiel du etaj erare vagaj katoj, ili sekvis trans la korton, al kie la pupa domo staris.

“Jen ĝi estas,” diris Kezia.

Estis paŭzo. Lilia laŭte spiris, preskaŭ ronkis; nia Elsa estis senmova kiel ŝtono.

“Mi malfermos ĝin por vi,” Kezia kompleze diris. Ŝi malkroĉis la hokon kaj ili rigardis internen.

“Tie estas la salono kaj la manĝoĉambro, kaj tio estas la -”

“Kezia!”

Ho, kiel timiĝe ili eksaltis!

“Kezia!”

Estis la voĉo de onklino Berila. Ili turniĝis. Ĉe la malantaŭa pordo staris onklino Berila, fikse rigardis kvazaŭ ŝi ne povis kredi, kion ŝi vidis.

“Kiel vi aŭdacu inviti la etajn infanojn Kelvey en nian korton?” diris ŝia frosta, furioza voĉo. “Vi komprenas, tiom bone kiom mi, ke vi ne rajtas paroli al ili. Forkuru, infanoj, tuj forkuru. Kaj ne revenu ĉi tien,” diris onklino Berila. Kaj ŝi ekpaŝis en la korton, kaj elpelis ilin, kvazaŭ ili estas kokinoj.

“Foren vi tuj iru!” ŝi kriis froste kaj fiere.

Ili ne bezonis dufojan ordonon. Brulante pro honto, kune ŝrumpi, Lilia kunpremiĝante kiel ŝia patrino, nia Elsa stupora, iel ili transiris la grandan korton kaj puŝis sin tra la blanka pordego.

“Malica, malobea eta knabino!” amare diris onklino Berila al Kezia dum ŝi brue fermis la pupan domon.

La posttagmezo jam estis abomena. Letero jam venis de Vilĉjo Brent, timiga minaca letero, diri, ke, se ŝi ne renkontos lin tiun vesperon en Boŝo Pulman, li venos al ŝia ĉefpordo kaj demandos kial? Sed nun, ke ŝi timigis tiujn ratojn Kelvey, kaj donis bonan skoldon al Kezia, ŝia koro sentiĝis pli malpeza. La kadavra premo malaperis. Ŝi reiris en la domon zumante.

Kiam la fratinoj estis ekster vido de la domo Burnell, ili sidiĝis por ripozi sur granda ruĝa kloaka tubo ĉe la flanko de la vojo. La vangoj de Lilia ankoraŭ brulis; ŝi forprenis sian ĉapelon kun la plumo kaj tenis ĝin sur sia genuo. Ili reve spektis super la fojnaj kampoj, preter la rivereto, al la grupo de akacioj, kie la bovinoj de Logan staris pretaj por melkado. Kiaj estis iliaj pensoj?

Nia Elsa baldaŭ puŝetis pli proksimen al sia fratino. Sed nun ŝi jam forgesis pri la kolera sinjorino. Ŝi etendis fingron kaj karesis la ĉapelan plumon de sia fratino; ŝi ridetis per sia malofta rideto.

“Mi vidis la etan lampon,” ŝi leĝere diris.

Tiam ambaŭ ree silentis.
